

## KRISTNASKO: IU DIO KUN HOMA VIZAĜO

Ekde ĉiam la homoj klopodis iĝi diaĵoj, sin levi super aliaj homoj, kaj “vi iĝos kiel Dio” estas la mensogo de la antikva serpento (Gen 3,5). La homoj lokis la diaĵon en la plej altoj (“Ĉu ne estas Dio alte en la ĉieloj?” Ijb 22,12), kaj en ĉiu tempo la revo de la povhavantoj estis sin levi super ĉiuj (“Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio mi levos mian tronon... min similiĝos al la Plejaltulo” Jes 14,12.14). Atingi la Sinjoron estis ankaŭ la plej alta sopiro de ĉiu religiulo: supreniri, spiritaliĝi, por mistike fandiĝi kun la nevidebla Dio. La povhavantoj opiniis eble atingi Dion, kaj esti samrangaj per akumulado de povo; la religiuloj per la akumulado de preĝoj.

Per Kristnasko, kontraŭe, Dio iĝas homo, malsupriĝante je la nivelo de ĉiu alia kreitaĵo. Nur la “malsaĝeco de Dio” (1 Cor 1,25) povis puŝi la Plejaltulon ne nur iĝi homo, sed tiel resti: la Sinjoro “sin malplenigis sin, prenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj” (Fil 2,7).

Per la naskiĝo de Jesuo, Dio ne plu estas la sama kaj ankaŭ la homo ne. Tute ŝanĝiĝis la rilato inter Dio kaj la homoj, kaj inter tiuj kaj ilia Sinjoro.

Povhavantoj kaj religiuloj pensis atingi la dian kondiĉon sin disigante de la aliaj homoj, la unuaj por ilin regi, la duaj por esti ilia brilega ekzemplo.

Ju pli la povhavanto volis supreniri, des pli li enprofundiĝis en la mallumon, “en la profundon de la abismo” (Jes 14.15), ĉar ju pli li malproksimiĝis de la aliaj homoj des pli li iĝis malhoma. Ju pli la religiulo sin distanciĝis de la aliaj por renkonti Dion, des pli tiu ŝajnis malproksimiĝi, iĝi neatingebla, ĉar sin disigante de la homoj li sin disigis de la Sinjoro (Lk 18,14).

Per Kristnasko oni komprenis la kialon. Oni ne devas supreniri por renkonti la Sinjoron, sed malsupreniri, ĉar en Jesuo Dio iĝis homo, profunde homa kaj sin metis je la servo de la homoj.

Dank’ al Jesuo Dio ne plu estas serĉenda, sed akceptenda (“Al tiuj kiuj lin akceptis...” Joh 1,12). Li estas la “Dio kun ni” (Mat 1.23), kaj petas esti akceptata kaj kun li kaj kiel li, iri al ĉiu persono por ĝin inundi per sia amo kaj igi la mondon pli homa.

En Jesuo Dio sin montris atenta kaj sentema je la suferoj de la homoj kaj je iliaj bezonoj. Ju pli oni estas homaj, des pli oni liberigas la diecon kiu jam estas en ni. Tio estas la mirinda surprizo de la Kristnasko de la Sinjoro.

*Alberto Maggi*